

Esperanto en Skotlando

Esperanto in Scotland - Esperanto ann an Alba
Aŭtuno 2017 - £2.50/€3



Foto de David Ball – www.davidball.net

La ŝipa muzeo 'Discovery' en la urbego Dundee

Enhavaj Elstaraĵoj – Kiom Lingvo Necesas por Penso: John Francis – Ĉu Diglosio ankaŭ en Esperanto: Renato Corsetti

Esperanto en Skotlando

Numero 206 - Aŭtuno 2017 -ISSN 0014-0643

Kunredaktoro: Ed Robertson

Redakcia adreso: 52 Easter Drylaw View,

Kunredaktoro: Hju Rid

Edinburgh, EH4 2QP

Administranto: Mia Casey

Telefono: 07970 156549

Rete: ed.robertson@esperanto.org.uk aŭ hju_rid@yahoo.co.uk

La redakcio bonvenigas kontribuojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limdato por la venonta kajero de **Esperanto en Skotlando: 30a de septembro 2018**. Oni sendu kontribuojn elektronike kiel simplan tekston aŭ uzante la formaton OpenOffice.org Writer aŭ LibreOffice Writer (senpage haveblaj de la koncernaj retejoj). Dokumentoj en la formato Word ankaŭ estos akceptataj. Se la formato aŭ tiparo uzata en via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, diversaj surogataj sistemoj estas akcepteblaj.

Enhavo

El Katedro.....	3
Kiom Lingvo Necesas por Penso.....	5
Ĉu diglosio aŭ du-tavola lingvo ankaŭ en Esperanto?.....	13
Ekskurso al Novjorko Aprilo 2017.....	20
La Koro de Midlothian.....	25
Ŝargi Ŝargon Per Ŝargo – Nia Lama Lingvo!.....	27
Kaj Por Fini: Io Leĝera.....	38
Kalendaro.....	40

La opinioj esprimitaj en Esperanto en Skotlando ne nepre kongruas kun tiuj de Esperanto en Skotlando aŭ EAS. Esperanto en Skotlando estas publikaĵo de la

Esperanto-Asocio de Skotlando: SC042398

Prezidanto: Hju Rid

Vic-Prezidanto: Jean Bisset

Sekretario: David Bisset

Kasisto: David Hannah

Adreso: 47 Airbles Crescent,

Motherwell, ML1 3AP

Telefono: 01698 263 199

Rete: secretary@skotlando.org

El Katedro

La horloĝo estas ŝaltita horon pli, la tagoj plilongiĝas, kaj ni komencas pli ĝui la freŝan aeron kaj eĉ pensas pri vojaĝado. Dum mi kunmetas ĉi tiun mesaĝon al niaj legantoj ni pretigas nin por baldaŭa vizito al Kimrio, por la 99a Brita Kongreso de Esperanto samtempe kaj kune kun la 3a Tutkelta Kongreso de Esperanto, kiu estos en la Centro Morlan, en la bela marborda urbo Aberystwyth la 13an ĝis la 17an de aprilo 2018. Inter aliaj allogaĵoj, mi tie prelegos pri la Piktoj kaj ilia lingvo, kaj klopodos malmisterigi ilin. Krome estos interesaj prelegoj, muziko, bufedoj kaj ebleco lerni la kimran lingvon.

En junio, tamen, okazos en la histoririĉa urbo Perth nia propra 113a Skota Kongreso de Esperanto (jes, la plej alta kongresnumero en la esperanta mondo!), en la Hotelo Royal George, Tay Street, Perth, de la 15a ĝis la 17a (aŭ eĉ 18a) de junio 2018. Se vi ankoraŭ ne aliĝis, faru tuj ĉe nia retejo:

<http://www.skotlando.org/index.php/congress-general>

La kongreso proponas buntan programon kun kvizo, prezentoj, ekskursoj al la Lagodomo-centro ĉe Aberfeldy por esplori kiel vivis niaj praantaŭuloj, kaj al Dundee por vidi la antarktikan esplorŝipon "Discovery". Nia kongresa gastparolanto estos la neforgesebla Nina Pietuchowska, el Bjalistoko, la naskiĝurbo de Esperanto mem! Ĝi promesas esti vere elstara kongreso.

Ĉi-somere, la 28an de julio ĝis la 4a de aŭgusto, la tutmonda, aŭ Universala Kongreso de Esperanto (nur la 103a :-P) revenos al Eŭropo, al la portugala ĉefurbo Lisbono. Jam pli ol 1200 homoj el 70 landoj aliĝis. Ĝi inkluzivos amason da eventoj, prelegoj, ekskursoj kaj aliaj allogaĵoj. Por pliaj detaloj, vidu <https://uea.org/kongresoj>

Ĉu vi eble timas, ke via rego de Esperanto ne sufiĉus por elturniĝi ĉe granda evento eksterlande kia la Universala Kongreso? Eĉ post multaj horoj laborante ĉe Duolingo? Tiam mi proponas senpagan semajnfinan kurson en aŭgusto en la “Somerlernejo” <http://esperanto.org.uk/events/somerlernejo/> ĉe la EAB-sidejo en Barlaston, Staffordshire, Anglio. Vi devos pagi propran hotelon kaj vespermanĝon sabate, sed la instruado kaj la tagmanĝaj bufedoj estos senpagaj.

Alternative, rekomendinda por pli intensa travivaĵo, estas Somera Esperanto-Studado (SES), agrabla tut-semajna kurso en bela Slovakio, de la 14a ĝis la 22a de julio 2018. Vi studos matene, kaj amuziĝos en internacia etoso posttagmeze, vespere, kaj nokte:

<https://www.youtube.com/watch?v=lgUpPYfaAXg>

<http://ses.ikso.net/2018/en/>

kaj se vi aĝas malpli ol 25 jaroj, eblas eĉ ricevi stipendion por iri tien (aŭ al alia Esperanto-aranĝo) pere de la Norwich Jubilee Esperanto Foundation: <http://nojef.org/grants/travel-grants>

Agrablan esperantumadon ĉi-somere, kaj agrablan legadon ĉi-ene!

Ed Robertson

Kiom Lingvo Necesas por Penso

(Noto de redaktoro: Jen la dua prelego kiun donis al mi Donald Makaskill, dumviva amiko de John Francis. La unua jam aperis en la pasinta numero. La duan mi prezentas ĉi-sube, denove kun la permeso de Donald MacDonald, la vic-filo de John.)

La ideo venis al mi ĉar, kiam mi ricevis la inviton de la sekretario mi havis en la kapo memoron de lastatempa argumento kiu celis pruvi ke pensado sen lingvo ne eblas, kaj tiam ŝajnis al mi ke estas multe da suko en tia argumento por parolo kia la nuna.

Tamen kiam mi ekpreparis ĝin mi trovis ke restas en mia memoro nur la nuda aserto ke lingvo necesas por pensado. Mi ne povis memori pruvojn pri tio – se tiajn mi ja aŭdis – kaj pri la ebloj de pensado sen lingvo nenio kompreneble estis dirita.

Io tamen restis klara – unuavida rigardo al la problemo emas trompi, ĉar la unua reago estas *'pensado ne estas laŭnecese profunda intelekta ekzerco; ĝi uziĝas por gvidi niajn ĉiutagajn aktivojn. Sekve estas erare ke lingvo por ĝi necesas.'* Tio estas, oni tuj perceptas ŝajne eraran, tro limigitan, aplikon de la vorto 'pensado', kaj supozas ke korekta, pli ĝenerala, apliko montros ke iuj specoj de pensado ja eblas sen uzo de vortoj.

Sed ĉu estas prave ke nia ĉiutaga porutila pensado okazas sen vortoj? Ni prezentu al ni situacion en kiu homo en inerta stato subite devias, kaj ni bildigu beston en sama situacio. La inerta stato povas esti marŝado: homo iras al trinkejo, tigro al lageto; ambaŭ estas pelataj de soifo, anbaŭ estas en inerta stato – la homo jam faris sian decidon iri al la trinkejo kaj nun pasive sekvas tiun decidon; la tigro jam reagis al instinkta ekserĉo kaj nun inerte daŭrigas sian moviĝon. Sed la homo subite decidas iri al la biblioteko survoje, kaj la tigro same subite decidas lasi la vojon por eniri la densejon. Kio

do okazis? Nova influo trafis ambaŭ kaj ŝanĝis la originalajn intencojn: la tigro eble vidis ion evitindan – rinoceron, ni diru – aŭ ekvidis ĉasaĵon ne preterlaseblan en la densejo, aŭ ial trovis la sunon subite netolerebla, aŭ tute simple trovis la vojon barita de falinta arbo aŭ simile kaj devas fari devion antaŭ ol daŭrigi la deziratan vojon. La homo eble memoris ke li devas redoni libron aŭ prunti novan aŭ fari enketon al la librotenisto aŭ kontroli ion en volumo kiun li mem ne posedas. Sed kvankam la kaŭzaj de la deflankiĝo estas same variaj en ambaŭ kazoj, ĉu la motivantaj reagoj de la protagonistoj estas samspecaj? La tigro povas *instinkte* fari sian devion en ĉiuj kazoj menciitaj – eĉ multe pli kruda organismo ol ĝi kapablas ĉasi aŭ fuĝi en konvenaj cirkonstancoj. La homo aliflanke nepre *pensas* laŭ ia formulo kia '*mi devas iri al la biblioteko pro ...*'.

eĉ se li ne konscie silabumas ĉiun vorton al si, li devas subkonscie utiligi tiajn vortojn por direkti sian – relative kompleksan – penson. Kaj se ni konsideros la plej multajn ĉiutagajn homajn agojn, ni trovos ke fakte ili estas malpli simplaj ol ni supozis – aŭ almenaŭ postulas pli kompleksan pensostimulon ol ni supozis.

Tio validas precize se ili ne estas rutinaj agadoj. Rutinaj agadoj mem *iam* postulis tian penson, sed post kutimiĝo la iniciata stimulo sufiĉas por sekvigi serion da aŭtomataj movoj – ĉiu movo estas stimulata de la antaŭa sen intervena penso. Se ni tro dependas de tiaj aŭtomataj sekvoj ni trovas ke ni faros erarojn eĉ en tre simplaj ĉiutagaj cirkonstancoj – tiel ekzemple oni en distra humoro foje metas salon en la teon, forĝegas malŝalti la elektron, kaj simile. Pure *instinktan* – kontraste al *praktikita* – reagon oni spertas sidante sur pinglon.

Ĉio ĉi tamen nur montras ke lingvo influas nian penson pli ol ni eble supozis, sed kio pri imagobildoj? Ĉu ne eblas pensi per tiuj?

Certe ili multe helpas je parkerado, kiel ĉiu populara libro pri memorkapablo povus pruvi. Estas ekzemple tre facile parkeri liston da senkoneksaj objektoj se oni bildigas ilin en fantaziaj rilatoj unu kun alia, ne pensante pri iliaj skribitaj nomoj. Estas ankaŭ facile parkeri dudek-ciferajn numerojn post unu-du minutoj uzante la saman metodon se oni unue utuligas sistemon kiu anstataŭas ciferon per konkreta simbolo. Uzo de tiaj konkretaj simboloj ankaŭ ebligas parkeri la ordon de plena lud-kartaro post kelkaj minutoj. Unu memor-specialisto pretendas ke iu profesoro fieris ĉar post ses-monata praktikado liaj studentoj povis memori la ĝustan ordon de lia kvindek-du ludkartoj en dudek minutoj aŭ pli; dum la metodon de la specilisto oni povis lerni post maksimume kelkaj horoj kaj parkeri la kartordon en kelkaj minutoj. Mi mem fakte trovis ke post ioma praktikado mi povis fari en malpli ol dek minutoj.

Sed ĉu imagobildoj estas pensado? Ĉu ni povus fari decidon helpe de imagobildoj? Certe ne por tiuj, kiuj ni ĝis nun pritraktis. Kial ne? Ĝuste ĉar ili estas senmovaj. Sekve ni ne povas pasi de unu stadio ĝis la proksima. Eble tio ne difinas pensadon – kaj ni poste iom rigardas aliajn difinojn – sed por tiu ĉi prelego mi provizore uzas la sekvontan difinon: *'Pensado devas ebligi movon for de origina konstato kaj atingon de konkludo.'*

Kompreneble eblas pensi ne atingante konkludon, sed mi opinias ke se oni ja faras tion – tio estas mense modifas konstaton en konkludon – tiam penso nepre okazis, kaj se eblas fari tion sen lingvo, pensado sen lingvo eblas. Sekve ni uzu ĝin kiel kriterion.

Mi ĝis nun atingis do la konkludon ke eĉ ĉiutagaj pensoj postulas vortojn eĉ kiam ni ne konscie cerbumadas tiujn, kaj ke estas eble prezenti al ni en la menso imagobildon sen uzo de vortoj, kondiĉe ke tiuj imagobildoj ne movas, tio estas ne atingas novan signifan staton. Ekzemple falanta ŝtono aŭ fluganta birdo ja movas, sed ili

konsistigas unu movantan bildon; la penso kiu bildigas ilin ne povas movigi ilin en novan signifan staton sen ekonduko de vortoj. Nu ĉu? Mi opinias ke ne.

Antiginte tiun konkludon mi ne povis progresi. Do mi ennazis volumojn pri la logiko, kiu multe okupas sin pri pensado, kaj trovis tie ke ja ekzistas – aŭ ekzistis – du ĉefaj sintenoj, kiujn ni povas nomi la Imagista kaj la Verbista, konforme kun la divido jam sugestita.

La Imagistan sintenon ni povas sumigi je la diro de Berkeley (unu el la plej fervoraj Imagistoj) ke *'filozofiaj enketoj estis entreprenitaj per imagoj'*. Tio estas evidente ekstrema sinteno subtenata de la teorio pri *'pura pensado'*, al kiu mi nun tiel *kritikeme* rilatas. Unu ĉikano pri tio estas 'kiel anstataŭi la vortojn kiaj 'se' 'aŭ' 'al', kaj la respondo estas ĉu necesas anstataŭi ilin? Memoru, ke kiam Platono konsilis la studadon de matematiko li esperis ke la plej kleraj homoj povas laŭgrade ignori la ligilojn al la konkreto kaj entrepreninte la abstraktan matematikon pretigi la menson por tiu 'pura pensado'. Do li evidente kredis ĝin ebla, kaj ekde la komenco rekomendis sciencon kiu almenaŭ en ĝia esenca formo ignoras vortojn. Tamen, mi ne konvinkiĝas ke oni povas solvi multajn problemojn ne uzante 'se', kaj estas ŝajne fakto ke ĝuste tre inteligentaj homoj ne povas facile krei al si mensobildojn. Do, ĉu ili povas elpensi purajn ciferojn – ĉar estus ĝuste tre inteligentaj homoj, kiu atingus la nivelon je kiu pura pensado eblas.

Sed ne ĉiuj Imagistoj estis tiel ekstremaj. Iuj nur pretendis ke imagoj estas la *unuvicaj* simboloj de pensado; vortoj la *duvicaj*, ĉar ĉi tiuj havas signifon sed ĝi estas nereakta – nur anstataŭo por simbolo, kaj cetere ili uziĝas nur ĉar oni povas manipuli ilin pli rapide ol imagaĵojn. Kiam vortoj ne havas imagan fonon ili ne havas signifon, laŭ la Imagisto¹.

Pli modernaj verkoj montris ke la postulo pri absoluta neceso de imago ne estas valida. La Imagistoj pretendis ke imago ĉiam devas realigi la vorton, kiu estas nur simbolo uzata por transdoni la imagon de menso al menso, sed fakte *diagramo* povas realigi ĝin, kaj oni povus ekzemple skizi heksagonon ne havante mensobildon, kaj percepti kaj korekti eventualajn erarojn en la skizo ne kontrolinte laŭ mensa bildo, ĉar se mensobildo necesus por tio, tiam *supera* mensa bildo necesus por kontroli la mensan bildon, kaj tiel plu ĝis senfino. Se pra-pra-bildoj ne necesas por mensobildo, do mensobildo ne necesas por la skizo.

Tamen, ĉu oni bezonas imagon 'malantaŭ' la vorto aŭ ne, ŝajnas vere ke estas ĝenerala rilato inter vortoj kaj mensobildoj; la vorto estas interkomunika simbolo por la bildo. Kaj jen stariĝas konstato: nome ke fari intelektan agon ne signifas pensi: necesas intelekta ago por koncepti la *ideon* de 'ruĝo', sed tio ne signifas ke ni pensas. Libera pensado eĉ ne bezonas la originan stimulon. Do eĉ se ni konsentas ke ni bezonas vortojn *kaj* mensobildojn por pensado, la uzo de ambaŭ ne en si mem garantias pensado nur pro la neceso 'traduki' la simbolojn.

Jen estas kelkaj logikistaj kaj filozofaj difinoj pri pensado:

'La plenigo de mankoj.'

'La studado pri objektoj kompreneblaj kaj la rilatoj inter tiuj.'

'Priscio en malesto.'

Neniu el tiuj multe helpas pri la demando ĉu necesas vortoj por pensado, ĉar ili ne solvas la problemon ĉu la Imagistoj ĉu la Verbistoj pravas, nome ĉu 'pura pensado' estas efektive ebla. Ili estas tro ĝeneralaj, kaj apliki al ili tiun aŭ ĉi tiu teorion estus same senkonklude kiel apliki ilin al la vorto 'pensado' mem. Ni do tenu nin al la difino ke 'pensado devas ebligi movon for de la origina

konstato kaj atingon de konkludo.’

Tiu ‘movo’, kiel ni jam konstatis, devas alporti signifoŝanĝon, kaj tion bele demonstras la diro ke ‘en pensado unu imagon murdas la sekvanta’, tio estas nia fluganta birdo ne bezonas penson eĉ se ĝi manovras kaj turniĝas, ĉar la kontinuo estas nerompata.

Aliflanke estas vere ke ni povas espensi longan kontinuan *ideon* kvankam ĝi postulas multe pli da vortoj ol ni kapablas prezenti al nia menso samtempe. Sekve devas esti koncepto malantaŭ la vortoj per kiuj ni prezentas al ni la penson, alie, kio gvidus ilin al konkludo. Neeblas ke ĉiu frazo simple gvidas al la sekvonto. Nome, nia lingva pensado funkcias interne de nia koncepto origina; pensado superfluas simbolojn; ni ĉiam pensas pli ol ni diras, kaj ofte la simbolo (vorto) ne adekvatas por nia ‘pura’ penso. Se la preterlingva pensado konsistas el imagoj ni povas konsenti kun la sinteno, ke vortoj kaj imagoj ambaŭ estas uzataj en pensado, sed mi persone ne konvinkiĝis ke imagoj necesas ĉu malantaŭ la simboloj por ligi tiujn kun la realo, kiel iuj asertas, ĉu por plenigi la truojn kie lingva pensado mankas. Mi opinias ke estas iu alia pli subtila mensa funkciado, kiun neniu ĝis nun ŝajne taksis. Tio estas, kie vortoj ne adekvatas ĉu por esprimi la penson al alia, ĉu por konkretigi ĝin en la menso, estas *neformitaj vortoj* kiuj ŝvebas malantaŭ la vorta skeleto, *ne* imageblaj. Tiuj neformitaj vortoj ne egalas al ‘pura pensado’, ĉar pura pensado *superas* vortojn, kiuj estus nur ĝenoj kaj balasto al ĝi, dum la neformitaj vortoj *mal*superas la vortigitan penson, estante nur la kruda esenco de vera pensado, instinktaj reagoj kaj sentoj ankoraŭ ne rafinitaj en racion, en simbolojn.

Alivorte, ŝajnas al mi ke ne estas klara divido inter instinkto kaj racia pensado: estas transiro inter la motivanta instinkto kaj la fina racia pensado, kaj eĉ kiam oni konkretigas la penson en vortojn tiu

pli kruda pensoformo ankoraŭ influas². Cetere, kiam oni lernas fari ion aŭtomate pro kutimo aŭ praktiko, estas stadio inter la neceso pensi pri ĝi kaj la eblo fari ĝin tute senpense: dum tiu stadio oni povas facile fari erarojn pro malatento, sed aliflanke ne devas pensi tiel konscie kiel en la komenco.

Tiu neformaligita pensado subtenas ne nur pervorte konkretigitan ideon, sed ankaŭ perbilde; ĉar mi fine decidis ke ja eblas pensi sen lingvo.

Al tiu decido helpis min ne la logikistoj sed psikologo al kiu mi trudis la demandon. Li petis min bildigi kvadraton ne pensante pri la *vorto* 'kvadrato', sed simple pri la *formo* ŝvebanta en nenio.

'Ĉu vi povas vidi ĝin?'

'Jes, sed tio ne estas pensado; ĝi ne moviĝas, ne kondukas min al iu konkludo.'

'Bone, imagu ke ĝi konstruiĝis el drato. Nun imagu ke ĝi havas diagonalon. Ĉu vi vidas tion?'

'Jes.'

'Kiujn angulojn kunligas via diagonalo?'

'Supre dekstra al malsupre maldestra.'

'Bone, nun imagu ke ĝi turniĝas. Ĝi turniĝas ĝis ĝi prezentas al vi nur eĝon. Ĉu vi povas vidi tion?'

'Jes.'

'Nun, daŭre turnante sin ĝi ekprezentas sian kontraŭan flankon; ĝi daŭre turniĝas ĝis ĝi revenas al rekta kvadrata prezento. Ĉu vi ankoraŭ vidas ĝin?'

'Jes.'

'Bone, kiujn angulojn kunligas via diagonalo?'

‘Supre maldekstra al malsupre dekstra.’

Jen do mi atingis konkludon pere de moviĝanta bildo kun ŝanĝiĝanta stato. Mi forte dubas, ĉu tio estus ebla sole per vortoj; mi fakte dubas ĉu vortoj iel helpus al la imagobilda metodo tie. Sola alia metodo estus la eksperimenta, kie oni povus uzi draton aparaton aŭ diafanan paperon kaj krajonon. Tiel oni solvus la problemon per la okuloj – eventuala pensado rilatus al la operacio, ne la solvado – kaj fakte estas la mensaj okuloj, kiuj ebligas pensi sen vortoj.

La ekzemplo, kiun mi uzis ŝajne pruvas alian konatan aserton – ke ‘Imagabildoj necesas por la solvado de spacaj problemoj.’ Ni jam vidis ke por alia speco de pensado vortoj necesas, eĉ kiam oni ne emas supozi ilin necesaj, kaj, ĉar la penso ĝenerale superfluas nian voĉigon de ĝi, tiu voĉigo ne registras ĉiujn pensajn nuancojn, parolante pri emociojn. Tial povas esti ke, provante analizi la originan penson, ni ne povas rekapti ĝin kaj ne povas decidi je kia grado ĝi estis vorta, ĝis kia grado bilda (cetere, ne forgesu ke la penson mem superfluis kvazaŭvortoj aŭ bildoj).

Ĉio ĉi nur emfazas kiel kompleksega estas la pensado, kaj fakte ni nun povus komenci esplori la aserton ke ‘en pura pensado ne necesas iuj ajn simboloj, ĉu vortaj, ĉu bildaj’ sed ni ne. Ni jam trovis ke ja eblas pensi sen vortoj, parolante pri spacaj problemoj, kaj tio ja estis la origina demando.

¹ *Nur temas pri tio ke la menso bezonas iujn sentebajn simbolojn per kiu ĝi povas pensi – iujn mediojn ‘en’ kiuj ĝi pensas.*

² *Tial mi ofte parolas pri la ‘koloro’ de fremda opinio.*

John Francis

Ĉu diglosio aŭ du-tavola lingvo ankaŭ en Esperanto?

1. Ĝenerale

Lingvoj evoluas. Ĉiuj konsentas pri tio kaj ĉefe la evoluigistoj de Esperanto. Ŝajnas, ke en la longega daŭro la lingvoj moviĝas eĉ de unu lingvogrupo al alia. Ekzemple la latinaj verboformoj: *am-o*, *am-as*, *am-at*, *am-amus*, *am-atis*, *am-ant* ŝajnas indiki, ke en pli frua periodo la hind-eŭropaj lingvoj apartenis al iu formo de aglutinaj/kungluaj lingvoj, kiel montras la pronomoj algluitaj post la verba radiko. Same la angla en sia plurjarcenta evoluo estas moviĝanta de la fleksiaj lingvoj al la izolaj. Ĝi baldaŭ atingos la ĉinan kun unusilabaj vortoj sen finaĵoj kaj tre rigida vort-ordo de la frazo. Iam ĝi devos ankaŭ inventi tonojn por distingi la plurajn samsonajn unu-silabajn vortojn.

Sed, forlasante la longeg-daŭran evoluon ni revenu al pli mallongtempa periodo. Ĉie, ĝuste pro la evoluo de la lingvoj, oni trovas fenomenon, kiun la lingvistoj nomas *diglosio*. Ili zorgas aspekti teĥnike kaj inventas teĥnikajn vortojn el la greka. *Diglosio* signifas simple dulingvecon, sed ĝi estas uzata en la senco, ke en la sama komunumo oni uzas samtempe du malsamajn lingvojn aŭ du malsamajn lingvo-variaĵojn. Unu lingvo aŭ dialekto estas la tiel nomata 'malalta variaĵo', kiun oni uzas hejme, en trinkejo, kun amikoj, en vendejoj, ktp. kaj la alia variaĵo estas evidente la 'alta variaĵo', kiun oni uzas en preĝejoj, en lernejoj, en oficejoj, en gazetoj, ktp.

En malsamaj landoj kaj epokoj la fenomeno havas malsamajn konkretajn ecojn. En la mezepoka Eŭropo oni uzis la latinan por preĝi, por instrui, por verki kaj lokajn lingvojn por la ĉiutaga interparolado. La fenomeno havas ankaŭ antikvan historion. Jam en la jaro 150 antaŭ la komuna erao en skriboj sur romaj statuoj

komencis aperi eraroj pri la akuzativo en la latina. Tion konfirmas ankaŭ la skribaĵoj sur la muroj de Pompejo. Alivorte la parolata latina ne plu havis la akuzativon, sed la oficiala, alta variaĵo, konservis ĝin ĝis niaj tagoj. De tiam en la ĝenerala konscio estis klara scio, ke malkleruloj parolas malklere kaj kleruloj parolas alian lingvon. En Italujo ankoraŭ nun oni parolas en lokaj variaĵoj de la norma itala kaj skribas ion ajn en la norma itala, kiun parolas ankaŭ la televido. Same en Germanujo, ktp. En arabaj landoj oni parolas en sia 'strata' araba, sed la televido parolas en la norma moderna araba, kiu konservas grandan parton de la finaĵoj de la klasika araba. En ĉiuj koloniaj landoj oni parolas en la lokaj lingvoj hejme sed en la lingvo de la fremda potenco en la lernejo.

Sed ni jam tro longe parolas pri la ĝenerala fenomeno. Estas tempo apliki ĝin al Esperanto. Zamenhof certe ne estis stultulo, kaj pro tio li kreis universalan lingvon sen dialektaj variaĵoj kaj sen sociaj variaĵoj. Principe ne ekzistas brita dialekto de Esperanto kaj rusa dialekto de Esperanto, sed nur unu normo de Esperanto. Kroatoj sekvas ĝin parole laŭ ĝenerala konvinko kaj ĉiuj pli malpli skribe. Same oni parolas al butikisto: "Bonvolu doni al mi du kilogramojn da ter-pomoj" kaj al la reĝo: "Bonvolu doni al mi du kilogramojn da medaloj pro meritoj diversspecaj."

Tamen multaj esperantistoj ne estas kontentaj pri tio, ĉar ili ne sukcesas distingi sin per sia lingvouzo de la grandaj amasoj. Pro tio oni klopodas ĉiurimede evoluigi altan, literaturan variaĵon de Esperanto kaj eĉ teoriumas pri tio, ke literaturistoj kaj teĥnikistoj ne povas uzi la saman lingvon de la ĝenerala popolo.

Estus laŭ ili tragedio se pediatro nomus sin infankuracisto, kaj se verkisto skribus, ke Petro estas malbona kaj malgranda anstataŭ ke Petro estas mava kaj petita dum Maria, kompreneble, estas pimpa kaj pinka.

Tiel, cetere, oni enportis en Esperanto la tutan grekdevenan teĥnikan terminaron: kardiografo, kardiogramo, kardiologio, kardiologo, kardiopatio, ktp., ne zorgante pri tio, kion ĉinaj esperantistoj komprenas aŭ ne komprenas. Finfine *Europa über Alles* (=Eŭropo super ĉio), kiel oni diras en Berlino.

Cetere ankaŭ en naciaj lingvoj oni ne interesiĝas, ĉu la simplaj homoj komprenas aŭ ne komprenas.

Foje mi staris en angulo de malsanulejo. Venis virino kun bebo kaj demandis min, en la itala kompreneble: “Ĉu vi scias, kie estas la kuracisto por infanoj? Oni frenezigas min en ĉi tiu malsanulejo kaj sendas min de unu loko al la alia.” Mi respondis: “Ĉi tie! Anoncu vin ĉe tiu pordo.” Mi estis staranta sub la granda ŝildo kun la vorto “Pediatria”, kiun popola virino ne povas kompreni, sed la pediatro sentus sin humiligita se oni nomus lin “dottore dei bambini”, kiel ĉiuj diras.

2. La granda franca invado

De la komenco ĝis la jaroj 1970-aj Esperantujo estis invadita de hordoj da francaj literaturistoj, kiuj ne legis la enkondukon de la lernolibroj, per kiuj ili lernis Esperanton. Kaj tamen Zamenhof ĝuste pensis pri ili, kiam li skribis: *“Mi aranĝis plenan dismembriĝon de la ideoj en memstarajn vortojn.....Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alikonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la lingvoj eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne tra leginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona), - li eĉ ne supozas, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo.”*

Unu el la plej danĝeraj komandantoj de la invadintoj estas iu

Gaston Warengnien, kiu en la antaŭparolo al sia unua eldono de Parnasa Gvidlibro ja diras jenon:

“(...) la tro ofta uzado de vortoj formitaj per la kontraŭecaj prefiksoj mal, ne aŭ sen (...) malutilas en poezio, ne ĉar ili ne estas sufiĉe elvokantaj, sed ĉar ili estas elvokantaj kontraŭsence. Efektive, se oni rememoras la klasifikon de la vortoj laŭ ilia elvokiveco, oni vidas, ke tiu estas des pli malforta, ju pli abstraktaj ili estas - kaj inter la plej abstraktaj troviĝas la gramatikaj iloj; kiel tia, la negacio estas absolute sena je poezia valoro. Por ke la leganto sentu la malon de unu donita impresio, ne sufiĉas kunmeti negacion kun la vortoj, kiuj ĝin esprimas; ĉar oni tiele ne forigas la evitendan bildon, oni elvokas ĝin, dum oni kredas ĝin forpeli. Tradukante poemon de Longfellow, kiu priskribas grizan vintran tagon. Grabowski skribas:

La tago malvarma, malgaja, sensuna...

verso taŭga por doni la impreson de sunplena somertago, ĉar tian bildon la tri mal aŭ sen neas ja intelekto, sed ne malaperigas el la sens-imago (...)”

Estas klare, ke nur fremdulo, nur persono ne sentanta Esperanton, kia ĝin sentas la plimulto el la ordinaraj uzantoj, povas tion skribi.

Ĉiuokaze dum la franca invado okazis amaso da oficialigoj de latindevenaj vortoj kaj la vortostoko de Esperanto konsiderinde latiniĝis kaj grekiĝis pri la teĥnikaj vortoj. Do, oni altrudis al Esperanto la dutavolecon ekzistantan en kelkaj eŭropaj lingvoj, alivorte kuracistoj kaj kleruloj parolu en maniero nekomprenebla de la popolo.

Krome la batalo de la francoj kontraŭ la sono *ĥ* kaj kontraŭ la prefikso *mal-* apartenas al la malhelaj paĝoj de nia historio.

3. La angla invado

Post la franca invado sekvis la angla invado. Ni estas travivantaj nun la komencon de tiu periodo.

Ĝi anonciĝis per vortoj kiel bizneso, sponsoro, desaponti, dirko, femala, hati, ktp. Ĝi disvastiĝis per Vikipedio. Rigardu, ekzemple la komencon de la artikolo pri verumeco en Vikipedio:

***Verumeco** (angle: truthiness) estas “vero”, kiun homo asertas scii intuicie “el interne” aŭ ĉar ĝi “sentas esti ĝusta”, malkonsiderante evidentaĵojn, logikon, intelektan ekzamenon aŭ faktojn.[1]Usona televida komediisto Stephen Colbert ekkreis la vorton tiel kiel temo de parto nomata “The Wørd” (La Vørto) dum la pilota programo de sia programo de satiro politika The Colbert Report je 17 oktobro, 2005. Uzante ĉi-tion rutine, Colbert satirigis la misuzadon de la emocia apelacio kaj korsento kiel retorikilo en nuntempa socipolitika parolado.*

Nu, evidente, estas parto de la homaj rajtoj la rajto verki tuj artikolon en Vikipedio en la unua stadio de lernado de Esperanto, sed tio havas pli profundajn efikojn ol verki poemon post la tria leciono, kiun faris niaj prapatroj.

Kaj la influo de la angla estas eĉ pli danĝera ol tiu de la franca, ĉar la angla estas lingvo malsama je Esperanto. Esperanto vivas per la ludo de la finaĵoj: iri, iro, ira, ire; tablo, tabla, table, tabla, tabli. Ĉi tiu sistemo komencas esti ne plu ekzistanta en la konscio de angloj. Kio estas *love* aŭ *post* kaj centoj da aliaj anglaj vortoj por anglalingvano? Ĉu verbo, substantivo, adjektivo? Oni povas eble respondi se oni havas kuntekston kaj studis lingvistikon.

Kien tio portos Esperanton estas ankoraŭ tro frue, por ke oni antaŭvidu klare. Sed jam nun pluraj fenomenoj estas videbaj. Ni citu nur la plej okulfrapaj. Ekzemple la teorio pri la seksa signifo de radikoj (vidu en PMEG la ĉapitron Seksa signifo de O-vortoj), kiu

provas forpuŝi la tradician francan, germanan, rusan interpreto de la vorto 'instruisto' aŭ 'belulo'. Kompreneble eĉ en reta kurso aperis la frazo: "Venis mia amiko. Ŝi estas Maria." Laŭ mi tiu streĉo estas kaŭzita de la angla. Same la tuta diskuto pri li, ŝi, ĝi kaj pri la senseksa pronomo, en kiu esence la interpreto de la angla 'it' malhelpas uzi 'ĝi' en Esperanto.

Ni ne parolu pri la gramatikaj konceptoj. Tre saĝe Duolingo ne provas instrui, ke ĉiuj substantivoj finiĝas per -o, ĉar usonaj lernantoj demandus: "Kio estas substantivo?"

4. Evoluo kaj evoluigo

En Esperanto, la vorto 'evolui' signifas laŭ la 1-a difino en PIV: *lompostio me disvolviĝi; regule k laŭnature kreskadi aliformiĝante*. Do, evidente, se lingvo evoluas, tio estas laŭgrada procedo, kiu iusence okazas mem. Ne temas pri lingva evoluigo.

"Ĉiuj lingvoj evoluas", ni diris en la komenco. Bone, sed en kiu lingvo en la lastaj 100 jaroj ŝanĝiĝis la vorto por "malbona"? En kiu lingvo post 100 jaroj oni povus skribi la ekvivalenton de ĉi tiu frazo en Esperanto: *Jen mava oldulo, kiu averaĝe aĉetas novan ĉipan printilon en ĉiu termo*.

La respondo estas simpla: en neniu.

Lingvistoj eĉ uzas la listojn de Swadesh (kaj aliaj) por esploroj pri la parenceco de lingvoj. Tiuj estas la vortoj, kiuj plej malfacile ŝanĝiĝas kaj per ilia komparo oni povas decidi ĉu la pralitova estas parenca al la dialekto de Parizo (kaj ni ja scias, ke ili estas parencaj). Jen ekzemplo de la bazaj vortoj, kiujn oni trovas en tiuj listoj de vortoj, kiuj ne ŝanĝiĝas:

I (Pers.Pron.1.Sg.); You (2.sg!); we; this; that; who; what; not; all; many; one; two; big; long; small; woman; man; person...*(emetita de redaktisto mi; vi; ni; tio ĉi; tio; kiu; kio; ne; ĉiuj; multaj; unu; du;*

granda; longa; virino; viro; persono).

Kiu interesiĝas pri la tuta listo komencu rigardi pri Swadesh en Vikipedio.

Nun estas evidente, ke la Fundamenta Esperanto bezonas esti lasata en paco fare de homoj, kies ŝatokupo estas inventi novajn radikojn. Lasu la parolantojn laŭgrade evoluigi novajn radikojn. Nun en Facebook/Feisbuko homoj daŭre diskutadas, ĉu diri 'podkasto' aŭ 'songazeto' kaj pri amaso da similaj vortoj. Sed la diskutoj apenaŭ tuŝas la vortojn de la listo de Swadesh dum multaj evoluigantoj interesiĝas ĝuste pri tiuj.

Nu, ni vidos. Kiam okazos la ĉina invado de Esperantujo multaj insistos, ke ne rajtas ekzisti internacia lingvo sen tonoj. Tio estos io por niaj genepoj.

Kelkaj leg-konsiloj:

- [*Fishman, Joshua*](#) (1967). "Bilingualism with and without diglossia; diglossia with and without bilingualism". *Journal of Social Issues*. **23**(2): 29–38.


- Swadesh, Morris. (1971). *The Origin and Diversification of Language*. Ed. *post mortem* by Joel Sherzer. Chicago: Aldine. ISBN 0-202-01001-

- Piron, Claude (2015) *La bona lingvo*, MAS: Edegem.

- Zamenhof, *Unua libro de la lingvo Esperanto en Fundamenta Krestomatio*, pluraj eldonoj

Renato Corsetti

Ekskurso al Novjorko Aprilo 2017



Estante skota kaj membro de la Klano Hannay – kaj kiel multaj aliaj homoj ĉi-tage – bezonas pli da mono ol niaj disponeblaj enspezoj por konservi kaj subteni nian praeraan hejmon de Sorbie Tower, nuntempe en ruiniĝinta stato nia Klanestro, alia David elpensis la planon transporti kelkajn el ni al Usono en kolektiva misio kun la celo trovi £1 milionojn da pundoj tie por helpi tegmenti nian Turon.

La pasintan jaron ni provis similan entreprenon ĉe la House of Lords en Londono, aranĝita por ni per la helpo de Lord David Hannay de Chelsea kaj Lord David Steele de Aikwood. Ĝi estis relative sukcesa evento, pro tio ke ni invitis ĉirkaŭ 100 membrojn kaj tiujn, kiuj portas niajn familinomojn; 40 ĉeestis kaj ni profitis per donacoj de proksimume £40,000 – longe for de la £2 milionoj, kiujn kostos tuta restarigo, laŭ nia takso.

Tamen, per nia "sukceso" ni celis pli altajn aferojn – ĉiuj scias, kiel riĉaj usonanoj estas, nun ni scias kial – li ne fordonas multe.

Post la kutimaj diskutoj pri kiel ni devus organizi nin mem, por iri kiel grupo kaj ĉiuj loĝi en la sama loko por la skota Tartan Semajno-festoj (Tartan Week) – ĉar ĉi tio estus aldonita altiro al niaj usonaj klanaj membroj kaj tiuj, kiuj portas niajn familinomojn – ni ĉiuj iris laŭ niaj malsamaj vojoj kaj vojaĝoj, laŭ niaj propraj cirkonstancoj. Iuj loĝis en Manhatano, proksime al la centro de la Tartan Week-eventoj kaj aliaj restis en lokoj ĉirkaŭ Novjorko. Mi elektis Nordan Bergen – rekte trans la rivero kaj 25 minutan aŭtobusan vojaĝon for de la centro de Manhatano.

Mia apartamento de AirBnB kostis malpli ol kvarono de la plej malfreneza hotelo/gastigado, kiun mi povis trovi en Manhatano, kaj konvenis al mi pli bone, ĉar mi povis eskapi al trankvileco ĉe la fino de ĉiu tago. Mi eltrovis, ke per aĉeto de libro da biletoj mi povis vojaĝi per normala buso por malpli ol \$3 ĉiufoje.

Luj esploroj pri vojaĝoj al Usono rapide montris, ke mia plej bona vojo estis flugo de Inverness ĝis Dublino kaj de Dublino al Novjorko JFK-Flughaveno, tio estas mia plej rapida elekto, kaj ankaŭ kiel mi lernis la plej senproblema por trairi la ekstreme striktajn usonajn doganojn, ĉar oni procezumas vin en Dublino kaj vi nur eliras el la pordo ĉe JFK.

Novjorko estas tre granda – necesis iom da tempo por iri de JFK al la centro de Manhatano, trovi la busstacion kaj transiri al mia AirBnB – ĉirkaŭ 3 horoj. Sed mi estis kontaktinta la dommastrinon kaj ŝi renkontis min tie kaj bonkore venigis min al tutnokta superbazaro por provizi min per iom da manĝaĵo dum mia semajno tie. Mi vere ŝatas WalMart.

Tagon unuan kaj jetaviadila mistempaĵo por akompani Tartan Week - renkontiĝis kun aliaj Klanaj Membroj por informado antaŭ nia 'Ricevo'. Ekzistas aktiva skota komunumo en Novjorko kun Caledonian Club, St Andrew's Society kaj la usona Skota Fondaĵo (ASF) kiu organizas la ĉiujaran Tartanan Semajnon.

La Klano-Hannay Societo estas korporacia membro de ASF por ke liberigo de imposto povas esti petata en dolaroj. ASF organizis la invitojn al nia bonvenigo, kiun oni okazigis en 3 Okcidenta Klubo, kun helpo de Brook Hanna, loka klano-membro. Pli ol 50 homoj ĉeestis la bonvenigon, kun aŭdovidaĵoj pri la Klano-Socio kaj la restaŭro de Sorbie Tower. Ĝi estis impona okazo kun bona fingrobufedo kaj bone stokita trinkejo.

Poste, al la Ceilidh (gaela danc-vespero) de la Nov-Jorka Caledonian Society – multe da alkoholo estis drinkata kaj kvankam tre homamplena mi sukcesis havi kelkajn familiarajn dancojn, antaŭ ol la hagiso kaj ne manĝis vespermanĝon, iom pli poste. Estis tre kuraĝe vidi tiom da malsamaj Tartanoj, kiuj estis portataj.

Novjorko estas ekscita loko por esti kun mirinda horizonto de

ĉielskrapantoj, kaj rigardante supren oni eble verŝajne estos atakita de homoj okupataj per siaj inteligentaj telefonoj.

Venontan matenon ni iris al la “Kapto de la Tartano” en la Preĝejo de St Agatha - tre mova kaj beletosa sperto, kaj post-tagmeze Klano Hannay estis unu el multaj grupoj inter la 3000 poste, kiuj marŝis malsupren laŭ 6-a Avenuo, kiu estis kovrita de gajaj homamasoj. Mi eĉ renkontis mian lokan MSP-on, kiun ni neniam vidas loke, kune kun kelkaj aliaj membroj de la skota registaro farantaj la plej bonan por la avantaĝo de Skotlando.

Estas tre vindinde en Novjorko, inkluzive de Trump Tower kontraŭ la ASF-oficejoj en Madison Avenue, kiu tiam estis blokitaj de polico aŭ manifestacioj. Krom iri al Centra Parko, mi vizitis Ground Zero, kiu estas sobra rememorigilo de 9/11. Tiam vizitis la Frick-Muzeon kun sia mirinda kolekto de historiaj pentraĵoj. Mi trafis tre tre homplenan boaton irantan ĉirkaŭ la Statuo de Libereco en tre brila sunplena tago. La Urba Busa Vojaĝo ankaŭ estis tre interesa sed plena de informoj, kiujn mi neniam memoros. Mi tagmanĝis en Winston Churchill Park.



Mi spertis aventuron en la subtera sistemo kaj finfine perdiĝis.

Neniu problemo, ĉar la stratoj estas ĉiuj aranĝitaj laŭ krado kaj mi simple reiris.

Estis nekredebla vidi tiom da lokoj, kiujn mi ankaŭ vidis en filmoj.

Ĝenerale, mi trovis Nov-Jorkon superŝuta kaj tre troa laŭ tio ke mi ne povis kompreni ilian sistemon por aĉeti manĝojn en restoracioj, kaj ankoraŭ ne, sed ŝajne ili retenas stabojn sen pagi la dungitaron, kiu dependas de nur trinkmonojn – ŝajnas kontraŭleĝe.

Organizi la bonevenigon en Nov-Jorko por la restaŭra-peto estis interesa sperto sed kelkfoje streĉa, ĉar ĝi okupis multajn malsamajn atendojn. Tamen ni faris multajn kontaktojn en Usono, establis donacan bazon kaj kovris niajn elspezojn kun aldonaj pundoj por la restaŭro. Sed la plej grava vizito plenumis la unuan celon, por kiu la Klano-socio estis formita nome: - “por promocii kaj plifortigi reciprokan intereson kaj kunulecon tra la tuta mondo inter ĉiuj personoj, kiuj portas familian nomon Hannay, Hannah, Hanna, Hanney kaj iliaj parencoj”.

Granda sperto kaj verŝajne ne ripetiĝos

Bedaŭrinde mi perdis ĉiujn el miaj bildoj de Novjorko kaj ne povis retrovi ilin.

David Hannah

La Koro de Midlothian

Mi legis interesan kaj informa libron kiu estas tre fama kaj kies verkisto estis konata kaj elstara romanisto kaj poeto de Skotlando dum la deknaŭa jarcento.

La romano nomiĝas *The Heart of Midlothian* (*La Koro de Midlothian*) kaj la verkisto estis Kavaliro Walter Scott. La scenejo de la romano estis la granda urbo Edinburgo dum la dek-oka jarcento, kaj la rakonto estas parte romantika kaj parte tragika. La plej imponaj karakteroj de la romano estas Reuben Butler kaj Jeanie Deans, kiuj deziras geedziĝi, sed ili ne povis fari tion, ĉar sufiĉe da mono mankis. Krome la fratino de Jeanie bedaŭrinde estis frapita de teruraj problemoj.

Jeanie kaj ŝia fratino, Effie, loĝis en tre malgranda domo ĉe la rando de Edinburgo. Ilia patro David Deans estis tre religia kaj serioza, kaj ilia vivstilo estis tre severa kaj pia. Liaj filinoj devis esti tre laboremaj en sia domo, sed Effie baldaŭ komencis helpi respektindan virinon, kiu havis butikon en la urbocentro. Do ŝi povis akiri pli da mono kaj povis aĉeti allogajn vestojn kaj doni multajn donacojn al siaj patro kaj fratino. Bedaŭrinde, la junuloj de la urbo baldaŭ deziris sekvi ŝin ĉie kaj amindumi ŝin. Kvankam Effie estis sufiĉe virta junulino, ŝi ne povis facile eviti la multajn junulojn, kiuj sekvis ŝin. Bedaŭrinde unu el la junuloj delogis Effie, kiu estis tre timoplena kiam ŝi gravediĝis. Ŝi ankaŭ timis informi siajn patron kaj fratinnon pro honto kaj malhonoro. Rezulte, la malfeliĉa junulino devis reveni hejmen post kiam ŝia bebo naskiĝis, sed ŝi aranĝis ke loka virino prizorgu la bebon. Tamen la policianoj decidis aresti Effie Deans, ĉar oni ne povis trovi la bebon.

Do finfine la kompatinda junulino estis kondamnita al tio ke oni pendumu ŝin pro la murdo de ŝia bebo. Jeanie kaj ŝia patro estis

treege malĝojaj, sed ili ne povis fari ion ajn por helpi Effie, kiu estis metita en la teruran maliberejon de Edinburgo, laŭ la nomo la Tolbooth. Tamen Jeanie decidis ke ŝi devas vojaĝi al Londono por akiri pardonon de la reĝino Caroline. Bedaŭrinde ŝi devis piediri la plej grandan parton de la tre longa vojaĝo. Tamen malgraŭ la malfacilaj cirkonstancoj, Jeanie fakte atingis Londonon, kie la duko de Argyle helpis ŝin renkonti la reĝinon en la palaco. La reĝino tiel multe kompatis la kompatindan junulinon ke ŝi decidis doni pardonon al Effie Deans. Do Jeanie ĝojis ke ŝi savis sian malfeliĉan fratinnon, kaj ŝi revenis hejmen al sia patro, kiu estis treege ĝoja kaj laŭdis la Sinjorinon kun multaj preĝoj. Finfine Jeanie Deans kaj Reuben Butler geedziĝis kaj estis treege ĝojaj. Fakte ĉi tiu romano baziĝis sur veraj okazaĵoj. Helen Walker piediris al Londono por akiri pardonon por sia fratinnon simile al Jeanie Deans.

Ĉi tiu libro estis ĝuinda kaj tre memorinda. Krome ĝi havas verŝajnecon, ĉar la verkisto konis la scenejon kaj komprenis treege la karakterojn. Kavaliro Walter Scott loĝis en Edinburgo, kaj tie li verkis la famajn Waverley romanojn, kaj ankaŭ multajn poemojn, ekzemple *The Lady of the Lake (La Sinjorino de la Lago)*. Li promenis tra Edinburgo kaj tie li renkontis multajn kaj diversajn homojn: riĉajn kaj malriĉajn, junajn kaj maljunajn. Li ankaŭ komprenis la historion de la urbo, aparte La Porteous Riots (tumultoj de Porteous) en la jaro mil cent tridek sep. Tial la fabelo de Jeanie Deans kaj ŝia fratinnon ŝajnas tute vera, kaj la detaloj kiujn Scott enmetas helpas la legantojn vidi klare la karakterojn kaj la okazaĵojn de la romano. Krome la romano havas feliĉan finon, ĉar Effie Deans ricevis pardonon kaj treege sukcesis dum estontaj jaroj. La plej grava detalo estas ke Jeanie Deans kaj Reuben Butler geedziĝis kaj vivis kune feliĉe dum tre multaj jaroj.

Norman Richardson

Ŝargi Ŝargon Per Ŝargo – Nia Lama Lingvo!

Ĉu Esperanto estas kiel aliaj lingvoj? Nu, jes kaj ne.

Jes:

1. ĉar ĝi funkcias inter ni same bone – se oni sufiĉe bone studis ĝin – kiel aliaj lingvoj.
2. ĉar ĝi evoluas – tio signifas ke ĝi kreskas, maturiĝas, ŝanĝiĝas – kiel faras aliaj lingvoj.

Ne:

1. ĉar ĝi estas kreita por esti kiel eble plej facile lernebla sed samtempe esti esprime pova. Ĝi estas regula kaj senescepta – preskaŭ!
2. ĉar, laŭ mi, oni ne lasu ĝin evolui en senprotektata hazarda maniero kiel faras aliaj lingvoj.

Estas tiuj, kiuj, same kiel karmemora Claude Piron¹, opinias ke la anstataŭigo aŭ paraleligo de bonaj jam ekzistantaj vortoj de Esperanto per neologismoj detruas ĝian specialecon. Mi tute komprenas kaj ĝis certa grado konsentas kun tiu sinteno.

Estas tiuj, kiuj opinias ke la lingvon oni lasu libera por evolui laŭ la bontrovo de la parola komunumo – la Esperantistaro – kiu respektas kaj amas la lingvon kaj gardos ĝian unuecon kontraŭ disdialektiĝo, kiel ili jam faras en la pasinteco. Tiu ĉi sinteno estas alloga. Kredante ĝin ni povas malstreĉiĝi de niaj zorgoj pri la estonteco de Esperanto ĉar oni povas ripozi, trankvila en la scio ke la komunumo fidindas por protekti ĝin. Ĝi ankaŭ utilas por kontraŭi la argumentojn de ne-Esperantistoj ke Esperanto ne estas natura lingvo kiel aliaj. Oni povus indiki la kreskon de la vortstoko kaj la subtilajn ŝanĝiĝojn de la gramatiko kaj diri ‘Jen, nia lingvo evoluas

same kiel via denaska nacia lingvo’.

Sed tio, kio maltrankviligas min estas la respondo al tiuj ĉi demandoj. ‘Kiel la Esperantistoj sciis, scias, kaj scios kiel gardi la lingvon? Ĉu iliaj lingvaj instinktoj sufiĉe fajnigas por scii kio bonas aŭ ne bonas?’

Mi opinias ke, sen eduko, la Esperantistoj nek scias, nek posedas sufiĉe fajnajn instinktojn. Kial? Ĉar jam multaj misoj okazis.

La celo de la kreinto de Esperanto estis provizi la mondon per efika interlingvo, kaj mi kredas ke ni devas ne instinkte, sed intence per bona kompreno konservi tiujn trajtojn kiuj taŭgigas Esperanton al ĝia rolo.

Du aferoj estas – la gramatiko kaj la vortprovizo. La gramatiko estas fortika kaj apenaŭ bezonas protekton. La vortprovizo tamen alias. Kvankam envenis en la lingvon aldonaj, ne analogaj, signifoj kiuj alroĉis sin al certaj vortoj, espereble la majoritato de esperantaj vortoj havas nur unu signifon kune kun aro da figure ampleksigitaj signifoj. Ni ne povas ŝanĝi historion, sed gravas ke ni ne ripetu erarojn en la estontecon. Kial grave? Ĉar por lernantoj, precipe lernantoj sen speciala talento por lerni lingvojn, la simpleco kaj regulateco fanfaronataj de ni prozelitoj devas estis realaj. Kiom vi konas da lernantoj kiuj plendas ke la lingvo ne estas la miraklo pretendita de la propagandistoj? Aŭ ĉu vi konas nur adeptojn?

Ĉu la lingvo ne havu sinonimojn? Nu, kompreneble, jes, precipe por poetoj kies verkoj dependas de la kapablo varii tonon, ritmon, asonancon ktp. Sed ĉu estas bona ekzemplo ĉe lernantoj ke oni enportas novan radikon, sen unue provi esprimi la ideon per la kunmetaj kapabloj de Esperanto – lingva trajto pri kiu prozelitoj laŭte krias?

Pli grava krimo, laŭ mi, estas enporto de nova radiko en nian

lingvon kies formo estas identa al jam ekzistanta radiko kun tute alia signifo.

Pro ĉi tiuj argumentoj mi subtenas du principojn de radikokreado

- 1) ne pruntu se la lingvo jam kapablas esprimi la ideon per jamaj rimedoj
- 2) neniam pruntu se radiko jam ekzistas en Esperanto kun tute nerilata signifo – inventu novan!

Akademiano petis min ŝanĝi terminon en la retejo de EAS. Tie mi uzis la terminon *bajter-* anstataŭ la ĝenerale uzata *bit-*. La argumento estis ke *bit-* estas jam dum jaroj disvastigita kaj estas ‘tre oportuna solvo de la konstantaj problemoj pri “digital/numérique” ktp.’


Mi respektoplene malkonsentas. Jes, ja, se ĝi ne vandale rabas de la jam ekzistanta radiko *bit-* kies signifo dum pli da jaroj estas ‘Ligna aŭ metala ŝtipo, fiksita sur bazo de ŝipa ferdeko kaj uzata por fiksi ŝnurojn aŭ ĉenojn’ – signifo apenaŭ etendebla metafore al komputila termino. Mia kunmetitaĵo almenaŭ ne akaparas de jam ekzistanta radiko. Plie, ĝia signifo estas tuj komprenebla al ne malbonvola Esperantisto.

Simila afero okazis en la sfero de muziko. Serĉu la signifojn de la vortoj *unuto*, *duto*, *trito*, *kvinto*, *sesto*, *septo*, *okto*, kaj *naŭto*. La escepto en la serio – kvarfoje – estas *kvarto*. Ĉu unika escepto en nia lingvo havanta senesceptajn regulojn?

Sed tio, kio plej ĉagrenas min estas la trudo, ŝajne metafore, de jama termino al uzo malkonsekvenc, mallogika, kaj fontante el nescio aŭ malatento. Mi parolas ĉi tie pri la vorto *ŝargo* uzata por nomi la elektran econ de atomaj aŭ subatomaj partikloj kiaj elektrono aŭ protono.

Por kompreni kial tiu termino tiom maltaŭgas necesas unue

kompreni la fizikon kiun ĝi tiel mallerte nomas. Ni komencu unue, entute ne malkonsekvence, per gravito.



La malsuba diagramo montras du sferojn. La pli granda maldestre havas mason, M , kaj reprezentas, ekzemple, nian sunon. La malpli granda dekstre havas mason, m , reprezentante, ekzemple, nian planedon. Evidente, la skalo ne estas reprezentanta. Pro la efiko de gravito ekzistas tira forto inter la du sferoj, indikata per la du sagoj. La maso, m , de la planedo efikas al la suno forton F . La maso, M , de la suno efikas al la planedo forton $-F$ (negativa pro la tria leĝo de Newton, kaj videbla kiel male direktita sago). Jen plej simple la principon de la gravita teorio de Newton.

Oni povas priskribi la aferon alimaniere, nome, per la koncepto de gravita *kampo*. Laŭ tiu oni imagas ke oni metas 'testan' mason, meteoroidon ni diru – do maso tro malgranda por perturbi la testotan kampon, en multajn diversajn lokojn ĉirkaŭ la suno. En ĉiu kazo oni trovos ke la forto ĉiam direktiĝas al la centro de la suno. Oni ankaŭ trovos ke la grandeco de la forto mezuriĝas proporcie al la inverso de la kvadrato de la distanco inter la centro de la planedo kaj la centro de la suno. Ĝi ankaŭ proporcias al la maso de la suno

multiplikata de la maso de la meteoroido. Resume per ekvacio jene:

$$F = G \frac{M \times m}{r^2}$$

F = gravita forto

G = universala gravita konstanto²

M = maso de la suno


m = maso de la planedo

r = distanco inter planedo kaj suno

Per multaj tiaj mezuroj oni povas mapi la spacon ĉirkaŭ la suno, tiel ke oni povas prezenti la direkton kaj la forton de la gravita kampo, *ekigita de la maso, M*. Kvankam oni emas pensi pri la gravita kampo ĉirkaŭ grandega objekto, malgranda maso ankaŭ havas tian. Nia planedo klare havas gravitan kampon, en kiu niaj korpoj kaj aliaj objektoj spertas tiron al la centro de la Tero. Eĉ niaj korpoj posedas propran gravitan kampon, sed, ĉar la konstanto G estas tiel malgrandega, ĝia efiko al malpli grandaj masoj estas neperceptebla.

Resume, do, la maso de objekto faras du aferojn. Unue ĝi ekigas ĉirkaŭ si gravitan kampon. Due ĝi respondas al la gravita kampo de alia objekto.

Estas tre analoge ĉe elektro. Por kompreni tion ni rigardu al la suba diagramo.



En la diagramo ĉiu rondo reprezentas partiklon portantan elektran econ laŭ la grandoj k_1 kaj k_2 respektive. La dekstra partiklo efikas al la maldekstra forton, F , kaj la maldekstra efikas al la dekstra forton, $-F$. Same kiel ĉe gravita kampo ni povas mapi elektran kampon ĉirkaŭ unu aŭ alia partiklo per metado de 'testa' elektra partiklo en diversaj lokoj ĉirkaŭ la koncerna partiklo. La rezulto de tia mapado estas tre analoga al la rezulto – je tute alia skalo – por gravita kampo. Resume per ekvacio jene:

$$F = k_e \frac{k_1 \times k_2}{r^2}$$

F = elektra forto

k_e = konstanto de Coulomb³

k_1 = elektra eco de partiklo 1

k_2 = elektra eco de partiklo 2

r = distanco inter la du partikloj

Estas neeviteble klare ke la formoj de la du ekvacioj, unu por gravito, unu por elektro, estas indentaj. Indas atentigi ke kvankam ĉe gravito ekzistas nur unu formo de maso, ĉe elektro ekzistas du, nome pozitiva kaj negativa. Se la du elektraj ecoj estas malaj, la forto inter la partikloj portantaj tiujn ecojn estas alloga. Se la du elektraj ecoj estas samaj, la forto inter la partikloj estas forpela. La elektra forto estas la nura ene de la kvar fundamentaj fortoj de la universo kiu povas esti forpela. Ĉiu el la aliaj tri – gravita forto, forta nuklea forto⁴, malforta nuklea forto – estas alloga. Sed la ekvacio restas, ĉar oni simple, dum kalkulo, enmetas negativan ciferon por negativa elektra eco kaj pozitivan por pozitiva. Post kalkulo oni interpretu la rezulton laŭe.

Resume, do, la elektra eco de partiklo faras du aferojn. Unue ĝi

ekigas ĉirkaŭ si elektran kampon. Due ĝi respondas al la elektra kampo de alia partiklo.

Estas klare ke ekzistas facile videbla komparebleco inter la gravita kaj la elektra kampoj. La gravita eco de partiklo – nome maso – ekigas gravitan kampon kaj faras tion ke alia partiklo sentas forton ene de gravita kampo. La elektra eco de partiklo ekigas elektran kampon kaj faras tion ke alia partiklo portanta elektran econ sentas forton ene de elektra kampo.

Sendube la leganto rimarkis ke mi parolis ĝis nun pri ‘elektra eco’ anstataŭ doni al ĝi nomon. Tiel mi faris ĉar la ĝusta nomo en Esperanto de tiu eco estas la demando kiun traktas tiu ĉi artikolo.

La nuna situacio estas ke ni nomas la econ *ŝargo*. Mi volas argumenti ke pli racie kaj inteligente estus nomi ĝin *ŝarĝo*. Plej racie kaj plej inteligente estus inventi tute novan radikon! *Ŝarĝo* ne perfektas sed la analogeco inter ĝi kaj *maso* estas klare videbla pro la ĵus eksplikita scienco pri fortoj. *Ŝargo* plene malperfektas ĉar ĝi nomas ilon.

Jen la reta PIV-a difino de *ŝargo*: ‘Eksplodaĵo kaj pafaĵo en pafilo’. En moderna pafilo – tio estas ekde la mezo de la dek naŭa jarcento – la eksplodaĵo kaj pafaĵo konsistigas unuopan aferon nome obuso aŭ kartoĉo. *Ŝargo*, do, estas ilo aŭ aparatero. Ĝi konsistas el pluraj partoj en taŭga aranĝo kiu ebligas al ĝi funkciigi la aparaton en kiun ĝi estas metota. Kartoĉo en pafilo kaj pilo en poŝtelefono estas arketipaj modeloj por tio, kion oni taŭge nomus *ŝargo*.

En kartoĉo la energio kiun ĝi provizos al la pafilo enhaviĝas en la ĥemiaĵo brulota je pafo. En pilo la energio kiun ĝi provizos al poŝtelefono enhaviĝas en la ĥemiaĵo kies reagoj pumpas elektronojn tra la aparataj cirkvitoj.

Kompreninte tiujn ĉi faktojn estas freneze apliki la saman vorton

al eco de partikloj, kiu 'funkcias' neniel simile. Estus same freneze uzi la vorton *ŝpato* anstataŭ *maso* kiam oni parolas pri la gravita eco de partikloj.

Akceptite estas ke oni povas paroli metafore pri ia sento de energiigo. Pensu pri kondensilo. Ni sentas ke la pliigo de la kvanto da elektra eco ene la kondensilo iel 'ŝargas' la aparaton. Oni parolas figure pri 'ŝargita etoso' en ĉambro, kvazaŭ iu enmetis ian psikan ŝargon en ĝin. Enorde, sed transmeti tian metaforon al bone komprenitaj fizikaj fenomenoj taŭgus nur se oni ankoraŭ vivus en la frua dek-naŭa jarcento. La amuziĝo tiama pro la prezentoj de elektraj magiistoj en burĝaj salonoj apenaŭ estas bazo por vortelektio en moderna lingvo. Kun la hieraŭa kompreno komenciĝinta en 1839 post la laboro de Michael Faraday estas neeble paroli pri la elektra eco kvazaŭ ĝi estas ilo kunmetita krude en materion per la manoj de homoj anstataŭ eleganta trajto de la naturo mem.

Per tia brutita kompreno oni povus pretendi ke oni ŝargas poŝtelefono per ŝargo (pilo) post la ŝargo de la ŝargo per ŝargo. Ĉu oni ankaŭ devas ŝargi la elektronojn per la ŝargo tiel ke ĉiu elektrono ekhavu unu el siaj naturaj ecoj?

Ni ilustru per komparo al gravito denove. Oni ja energiigas elektran aparaton, sed oni analoge energiigas pezaĵon se oni levas ĝin ene de la gravita kampo de la Tero. Sed vidu, ĉar la Tero ricevas la saman forton ĝi ankaŭ 'altiĝas' en la gravita kampo de la pezaĵo!

Efektive la energion tenas nek la Tero, nek la levita objekto sed *la gravita kampo mem*. Same pri elektra kampo. La energion de 'ŝargita' kondensilo tenas la elektra kampo, tute ne la partikloj mem. La energiigo ekiĝas pro tio ke oni *apartigas* la elektrajn partiklojn, same kiel ni levas pezaĵon en gravita kampo, tiel apartiganta la centrojn de la du masoj.

Do, pro la jam klarigitaj kialoj mi neniam uzos la vorton *ŝargo* en ia ajn elektra kunteksto. Mi ne volus tiel hontigi min. Mi uzus prefere la vorton *ŝarĝo*. Kvankam ne perfekta, ĝi multe pli taŭgas.

Laŭ reta PIV *ŝarĝo* estas ‘Tuto de pezaj objektoj, portataj de iu’ - ankaŭ ‘Forto, estigata de surmetita maso’. Klare *elektra ŝarĝo* pli taŭgas ol *ŝargo* por nomi la elektran econ.

Estas plia senco en kiu *ŝarĝo* taŭgas, nome en la studfako de kurento. Fizikistoj pensante pri elektra fluo parolas pri la partikloj kiuj *portas la elektran ŝarĝon* movotan. Ekzemple, en metalo elektronoj portas ĝin. En elektrolito portas ĝin pozitivaj kaj negativaj jonoj. En duonkonduktiloj elektronoj kaj pozitivaj truoj portas ĝin. Pro tiu ĉi koncepto pri eletroportiloj kaj la analogeco kun gravito estas mia senduba konvinko ke el la du vortoj *ŝargo* kaj *ŝarĝo*, la dua estas preferinda. Se vi ne konvinkiĝas, imagu elektranon en metala kristalo aŭ jonon en akvo kiuj portas elektrajn kartoĉojn.

Sed, sed, sed, tamen – la paraleleco ne estas perfekta. Kiam oni pensas pri la afero, ordinara *ŝarĝo* spertas gravitan forton pro la masa eco havata de ties atomoj. Do por esti fidela al la analogo kun gravito oni devus paroli pri la elektra eco kiel *elektra maso*. Por testi tiun ideon en mia menso, ĉar mi estas denaska anglaparolanto, mi imagas ĉu anglaparola fizikisto komprenus la terminon ‘electric mass’ kiel ‘charge’. Mi opinias ke, post iometa pensado pri nekutima termino, jes. Do tiu termino taŭgas.

Sed, sed, sed, tamen! Ni parolas Esperanton kun ĝiaj viveco kaj vervo. Ĉu ni ne povas inventi novan terminon?

Esperanto estas perfekta por tia situacio. Per simpla ŝanĝo de litero – vidu la diferencon inter *pezi* kaj *pesi* – aŭ per saĝa prunto el alia lingvo estus eble trovi novan radikon kiu ne vandalus la lingvon. Male, ĝi riĉigus ĝin.

Pensinte pri la afero mi trovis kvar eblecojn el aliaj lingvoj – nome la angla, franca, germana kaj hispana/portugala. Miaj proponoj estas la jenaj:

1. *ĉarĝo* (de la angla prononco de *charge*)
2. *ŝarĝo* (de la franca prononco de *charge*)
3. *ladungo* (de la germana vorto *die Ladung*)
4. *kargao* (de la hispana vorto *la carga*; portugala vorto *a carga*)

Neniu el tiuj proponoj jam ekzistas kiel radikoj ene de nia lingvo. Do vandalismo ne okazos. El tiuj, mia preferata estas *kargao*, pro ĝia ne-troa simileco al la jamaj vortoj *ŝargo* kaj *ŝarĝo*, sed ankaŭ pro ĝia analogeco al *kargo* kaj la ideo de portataĵo. Ankaŭ la akcento sufiĉe diferencigas ĝin de *kargo*.

Resume, do, en ĝeneralo ni estu tre zorgaj pri la radikoj kiujn ni enportas en Esperanton kaj ni sekvu klarajn regulojn. Se temas pri faka vorto, oni nepre konsultu fakspertulon. Specife, la vorto *ŝargo* multe malpli taŭgas (fakte mistaŭgas) kompare kun la vorto *ŝarĝo* por nomi la elektran econ de partiklo, kaj plej malpli kompare kun *kargao*, kiu ne duoble vandalas Esperanton.

Mi lasas la elekton al nur la Esperantistoj. Plej grave estas, neniam kaŭru antaŭ Akademiano!

¹ Vidu la artikolon de *Renato Corsetti* sur paĝo 13.

² G egalas al $6.67408 \times 10^{-11} \text{ m}^3 \cdot \text{kg}^{-1} \cdot \text{s}^{-2}$

³ k egalas al $8.98755 \times 10^9 \text{ N} \cdot \text{m}^2 \cdot \text{C}^{-1}$

⁴ krieganta bezono por sinonimo!

Hju Rid

Kaj Por Fini: Io Leĝera

Farmisto alvenis peraŭte ĉe la domo de najbara farmo, kaj frapis ĉe la pordo. Knabo, proksimume 9-jaraĝa, malfermis la pordon.

“Ĉu via paĉjo aŭ via panjo estas ĉeĥeĵme?”, demandis la farmisto.

“Ne, ili iris al la urbo.”, respondis la knabo.

“Kaj via pli aĝa frato Berto? Ĉu li estas ĉi tie?”

“Ne, li iris kun panjo kaj paĉjo.”

La farmisto staris tie dum iom da tempo, malpacience movetante, kaj grumblante al si mem.

“Mi scias kie estas ĉiuj iloj, se vi volas pruntepreni ion, aŭ mi povas transdoni mesaĝon al miaj gepatroj kiam ili revenos.” diris la knabo helpeme.

“Nu,” diris la farmisto, “Mi vere volis paroli kun viaj gepatroj. Temas pri via frato Berto, kiu gravedigis mian filinon Suzi”.

La knabo pripensis dummomente.

“Pli bone estus paroli kun Paĉjo pri tio. Mi scias, ke li postulas £300 por uzo de la virbovo, kaj £50 por la virporko, sed mi ne scias kiom li postulas por Berto.”

Viro legis sian gazeton, kiam reklamo pri aŭto tuj altiris lian atenton: Lamborghini por nur £250! Preskaŭ nova! La viro opiniis, ke estus tre malkutime vendi tian aŭton kontraŭ nur £250, kaj li opiniis, ke eble temas pri ŝerco, kaj vere ĝi devus kosti pli ol centoble tion.

Tamen, sciante, ke ĉiam indas enketi, li do iris al la domo de la sinjorino, kaj efektive, ŝi vere havas preskaŭ novan Lamborghini.

“Vaŭ!” diris la viro. “Ĉu mi rajtas fari provveturon per ĝi?” Kaj kontraŭ liaj atendoj, la viro eksciis, ke la aŭto funkcias tute bonege, kaj li reveturis ĝin reen la la domo de la virino.

“Kial vi vendas ĉi tiun mirindan Lamborghini kontraŭ nur £250?” li demandis.

“Mia edzo ĵus forlasis min kaj forkuris kun sia sekretariino,” diris la virino, “kaj li proponis, ke mi rajtas havi la domon kaj la meblaron, kondiĉe ke mi vendu la aŭton kaj sendu al li la monon kiun mi por ĝi ricevus.”

Ĉe la flughaveno Heathrow apud Londono sur la asfalto etendiĝis 100-metra ruĝa tapiŝo ĝis la aviadilo de la prezidento de Usono, tiam Barack Obama, por bonvenigi lin al Anglio. Ĉe la alia fino de la tapiŝo atendis la angla reĝino Elizabeth, kiu salutis lin per entuziasma sed digna manpremo. Ili tiam estis veturigataj, en arĝentkolora antikva Bentley, de la flughaveno ĝis loko pli proksima al la centro de la urbego, kie ili transiris al 17a-jarcenta kaleŝo tirata de ses imponaj blankaj ĉevaloj.

Dum ili rajdis en la direkto de Buckingham-Palaco, kun ĉiu el ili rigardantaj al unu flanko kaj poste al la alia, ĉio bone progresis. La sceno estis vere impona elmonro de pompo kaj ceremonio. Tamen, subite la digna sceno detruigis kiam la dekstra malantaŭa ĉevalo eklasis la plej teruran pac-rompan furz-eksplosion, kaj la kaleŝo pleniĝis je aĉega fetora haladzo.

Malkomfortaj, sed restante dignaj, la du ĉefuloj klopodis malatenti la okazaĵon. Tamen, la reĝino decidis, ke estus stulte simple ignori la tutan embarasan aferon. Ŝi turnis sin al prezidento Obama kaj diris “Sinjoro prezidento, bonvolu akcepti mian bedaŭron. Vi certe komprenas, ke ekzistas iuj aferoj, kiujn eĉ reĝino ne kapablas malhelpi.”

Barack Obama, ĉiam la ĝentlemano, respondis, “Reĝina moŝto, bonvolu ne pardonpeti; tiaj aferoj okazas. Vidu, se vi ne dirintus ion, mi tuj supozus, ke kulpas unu el la ĉevaloj.”

Kalendaro

aprilo 2018

ven. 13. - mar. 17. de aprilo 2018

99a Brita kaj 3a Tutkelta Kongreso de Esperanto, Morlan Centre, Aberystwyth, Kimrio.
Inf.: esperanto.org.uk/eab/eab_events.htm#events_2018

majo 2018

16 - 23. majo

[Mirinda Lviv](#) - Lviv, Ukrainio. Esperanto-renkontiĝo, kies celo estas plialtigi la lingvonivelon de partoprenantoj kaj konatigi ilin kun la kultura ĉefurbo de Ukrainio.

Inf.: Volodimir Hordijenko, p/k 35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio.


Rete: volodomir@ukr.net

junio 2018

15 - 17. junio

[Skota kongreso de Esperanto](#). La 113a Skota kongresoj de Esperanto okazos en 'The Royal George Hotel', Tay Street, Perth.

Skanu la suban kodon por eki
konversacion kun nia paĝo en
Facebook



Skanu la suban kodon por
trovi nian retejon

